# La Bulteneto

Numero 82 - Esperantojaro 140 Nummer 82 - Jahr 2026

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN

# NOVA MONERO-MEDALO




## OKAZE DE LA 111-A UNIVERSALA KONGRESO EN GRAZ - GRACO

## POR LA HONORO DE JULIA ISBRÜCKER

# La Bulteneto

Numero 82 Esperanto-jaro 140

Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko > La Bulteneto

Redaktejo - eldonejo - presejo:

**Viena ESPeranto-Aktiveco VESPA**

Tekstoj: Renate kaj Walter Klag

esperanto@chello.at

Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono

# Esperantokulturo kaj STELO
# Nova monero 200 Steloj

La Esperantokulturo havas ne nur proprajn lingvon, literaturon, historion kaj muzikon, sed ankaŭ propran monon:
Iam la Spesmilon, nun la Stelon.
Tia monero estas facile montrebla simbolo de la viveco de la Esperanto-lingvo. Aktuale uziĝas plastaj Stelo-moneroj dum junularaj Esperanto-kongresoj.
2026 aperis nova medalo-monero okaze de la 111-a Universala Kongreso en Graco - Graz [grac] kaj por la honoro de la nederlandino Julia Isbrücker:
Nominalo 200 Steloj, diametro 40 mm, maso 31 g, dikeco 3 mm.
Je unu flanko videblas en la mezo 200 STELOJ 2026.
Supre legeblas ESPERANTO.
Sube 111-A UNIVERSALA KONGRESO GRAZ kaj
UNU UNCO DA LATUNO KUPRO 63 ZINKO 37.
Aliflanke videblas portreto de Julia Isbrücker kaj 1887 – 1971.
La eldonkvanto estas nur 350.
La materialo estas latuno, kiu konsistas je 63 % el kupro kaj
37 % el zinko.
Produktis la moneron la firmao Pichl [piĥl] okcidente de la tirola ĉefurbo Innsbruck [insbruk] en Aŭstrio.

**Prezo: 18 € + sendokostoj.**

Por eventuala aĉeto skribu al esperanto@chello.at

# Letero de la estro de la firmao Pichl

Kara s-ro Klag,

Bonvolu trovi kelkajn informojn ĉi-alligitajn. Ni ĉefe fabrikas medalojn kaj monerojn, sed ankaŭ produktas kaj distribuas insignojn kaj pinglojn. Niaj ĉefaj merkatoj estas Svislando, Germanio, Aŭstrio kaj Norda Italio. Vi povas trovi nian kompanian historion ĉe https://www.pichl-medaillen.com/Unternehmen/UEber-uns/.

Ni pregas ĉefe medalojn el latuno (ĉirkaŭ 80 %), sed ankaŭ iom el arĝento kaj oro. Depende de la grandeco de la medalo ni pregas ĝin per 300 ĝis 1200 tunoj da premoforto. Por pregado ni bezonas taŭgan stampilon. Niaj grafikaj dizajnistoj kreas la suĵetojn per komputiloj, niaj gravuristoj preparas ĉi tiujn datumojn per CNC-maŝinoj. La pregiloj estas poste gravuritaj per ĉi tiuj maŝinoj. Post la stampado ni arĝentumas, orumas aŭ bronzumas la medalojn en nia galvaniza instalaĵo kaj poste poluras, brosas aŭ patinas ilin. Nuntempe laboras ĉe ni en Tirolo 25 homoj. Se vi hazarde estas en Tirolo kaj interesiĝas, vi estas bonvena viziti nian fabrikon.

Kun koraj salutoj al Vieno

Martin Pichl
[piĥl]

**CNC** signifas Komputiligita Numerika Kontrolo, angle Computerized Numerical Control. CNC-maŝinoj kapablas aŭtomate produkti objektojn kun alta precizeco, eĉ por kompleksaj formoj per la uzo de kontrola teknologio.

# Latuno – universala alojo

Alojo estas miksaĵo el du metaloj aŭ el unu metalo kaj unu ne-metalo.
Metalo havas kvar ecojn:
1… Alta elektra konduko, kiu malpliiĝas kun kreskanta temperaturo;
2… Alta varmokonduko. Tial metalo sentiĝas kiel malvarma;
3… Duktilo, kiu ebligas la formadon de maldikaj tavoloj kaj longaj dratoj;
4… Metala brilo.
Tiuj kvar ecoj baziĝas sur la fakto, ke en metalo troviĝas multe da libere moviĝeblaj elektronoj.

Bronzo kaj latuno estas ofte uzataj alojoj.
Bronzo estas miksaĵo el kupro kaj stano. Dum la bronzepoko – en Eŭropo ĉirkaŭ 2200 ĝis 800 antaŭ nia erao – produktiĝis el bronzo multe da iloj por metio; glavoj, kaskoj, ujoj, kudriloj kaj multaj aliaj. Samtempe produktiĝis ankaŭ latuno. Tio estas miksaĵo el kupro kaj zinko. Romianoj uzis ĝin por moneroj. Latuno estas pli facile formebla kaj antibakteria, ĉar la kupro mortigas bakteriojn. Hodiaŭ oni uzas latunon por tuboj, ladoj, akvokranoj, seruroj, garnaĵoj, seruroj, ŝlosiloj, moneroj kaj tiel plu.
La 1-Stela monero konsistas el bronzo, la 200-Stela monero el latuno: Alojo 63 % kupro kaj 37 % zinko.
La Eŭro-moneroj je 10, 20, kaj 50 cendoj konsistas el nordia oro. Tio ne estas oro, sed latuna alojo el 89 % kupro, 5 % aluminio, 5 % zinko kaj 1 % stano.

# Plenvaloraj kaj fi(d)ataj moneroj

Antaŭ dumil jaroj kelkaj moneroj estis preskaŭ plenvaloraj. Ĉiu monero estis kvazaŭ peco da metalo kun konkreta valoro, ofte oro, arĝento aŭ alojo. Ekzemple: 10 gramoj da oro kostas 900 €. El tio ni faras moneron kun la nominalo 1000 €. Da diferenco 100 € estas necesa por produkti la moneron. Tia monero estas preskaŭ plenvalora.
Se oni uzas ne-noblan metalon, ekzemple kupron, temas pli fiata aŭ fidata monero. La metalvaloro estas malpli ol 1 €, sed la nominalo estas ekzemple 10 €. Ĉiuj Eŭro-moneroj de unu €-Cendo ĝis 2 € estas fiataj, same paperaj monbiletoj.

# Etimologio

La vorto latuno devenas de la araba vorto laṭūn (لَطُون), kiu estis pruntita el la turka altın (oro). La vorto eniris multajn eŭropajn lingvojn: Itale lattone, france laiton, hispane latón, svede mässing, finne messinki, hispane latón.




5 Steloj 1959 el latuno



Frezado de stampilo per CNC-maŝino. Foto Pichl.




Google Maps

# STELO-TABELO

| Nominalo | Materialo | Maso | Dia-metro | Jaro | Eldon-kvanto |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 Stelo | Bronzo | 3,4 g | 20 mm | 1959[1] | 5000 |
| 5 Steloj | Latuno | 5,0 g | 23 mm | 1959[1] | 5000 |
| 10 Steloj | Cu + Ni | 9,0 g | 28 mm | 1959[1] | 5000 |
| 25 Steloj | 75% Cu + 25 % Ni | 19 g | 37 mm | 1965 | 1000 |
| 25 Steloj | Ag 0,900 | 25 g | 37 mm | 1965 | 5000 |
| 25 Steloj | Au 0,983 | 50 g | 37 mm | 1965 | 10 |
| 1 Stelo | Plasto ruĝa | 0,8 g | 23 mm | 2012 | 3000 |
| 3 Steloj | Plasto flava | 0,9 g | 25 mm | 2012 | 3000 |
| 10 Steloj | Plasto verda | 1,3 g | 29 mm | 2012 | 3000 |
| 100 Steloj | Ag 0,999[2] | 1 unco 31,1 g | 37 mm | 2018[3] | 1000 |
| 50 Steloj | Ag 0,925 | 30 g | 40 mm | 2020 | 300 |
| 5000 Steloj | Pt 0,9995[4] | ½ unco 15,6 g | 30 mm | 2025 | 25 |
| 200 Steloj | Latuno 63 % Cu + 37 % Zn | 31 g | 40 mm | 2026 | 350 |

Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, Pt = plateno, Zn = zinko, g = gramo.

Informo pri la prezoj: esperanto@chello.at

---

[1] Pregitaj en la jaro 1960

[2] La monero konsistas 999/1000 el Ag, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Ag-stampo estas 925.

[3] Pregitaj en la jaro 2017

[4] La monero konsistas 999,5/1000 el Pt, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Pt-stampo estas 950.

# Anoncoj



Floro de frago fotita de Irene Klag

# Monero-medalo 5000 Steloj el pura plateno

La Aŭstria Monerfarejo AG pregis 2025 platenan moneron
kun nominala valoro de 5000 Steloj.

**Eldonkvanto: Nur 25 ekzempleroj.**

**Aĉeteblaj ankoraŭ 10 ekzempleroj.**

Materialo pura plateno 999,5/1000.
Diametro 30 mm ± 0,1 mm.
Maso 15,56 g ± 0,1 g (½ unco).







**Prezo: 1200 €**

Pregita en ringo, ripa rando, stampita, surfaco spegulanta brilo (prooflike).

Averso:

5000 STELOJ 2025 — ESPERANTO – UNU UNCO
DA PURA PLATENO 999,5 – Steloj.
Platenstampo laŭ aŭstria leĝo Pt 950.

Reverso:

Motivo prenita el 50 Steloj "JULIA ISBRÜCKER ESPERANTO 1887-1971"

Informoj kaj mendoj: Walter Klag, Vieno, esperanto@chello.at

# Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la fakgrupo „Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo „Esperanta Numismatiko”, probable la ununura tia fakgrupo en la historio de Esperanto.
La instiga fakto estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.
2014 - 2025 ENA varbis mondvaste 172 individuajn membrojn kaj 25 asociajn membrojn.
Agrable por ni kaj vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!
Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: „Mi konsentas aliĝi”).
Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!
Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn, 4 numerojn jare.
Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA. Se vi deziras kromajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

Vi rajtas unue peti provnumeron!
Vi decidos poste!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,
Bert Boon
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de
„Esperanta Numismatiko”





# Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9

Haltestelle Herrengasse der U3

☏ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h

Donnerstag 10 bis 21 h

**Esperantokurse und Führungen auf Anfrage**

Im selben Haus befindet sich auch die **Musikaliensammlung** und das **Globenmuseum**